ya en col          abril/2000


# AVANCO

1/2000
Januaro-Aprilo
(XI-a jaro, Nro. 3)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio






# 17-a Komitatkunsido de KEA

## Estimataj:

Jen la kutima speciala numero de nia bulteno Avanco, dediĉita al la Komitatkunsido kaj al la Estrara Raporto. Kiel Vi vidos, ĝi estas sufiĉe detala... fakte, ni devis zorge kontroli la redaktadon pro tio, ke ni disponas pri nur 20 paĝojn. Do, restis al ni eĉ ne paĝeto por novaĵoj kaj la rubrikoj. Ni devos atendi la venontan numeron, ve!

Via Redaktoro,
Lic. Alberto García Fumero



## NACIA ESTRARO

***Maritza Gutiérrez González**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon./Historio, Ameriko, **Avanco, La Noktuo** kaj **Universo**

***Martha Alonso Gutiérrez**
Financoj./Resp.pri administraj aferoj.

***Alberto García Fumero**
Informado./Hejmpaĝo

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj./Biblioteko

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.

***Manuel Rodríguez Rábago**
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj
*Roberto Torres Alvarez
Atento al alilandaj e-istoj.
*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.
*Carmen A. Hernández Socarrás
Faka Agado

**XI-a jaro, nro.3 1/2000, (jan.-apr.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Roberto Molina Gálvez / Prezo: 1:00 CU 15 (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u /**
**Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).**

## 17-a Nacia Komitatkunsido en Santiago

Ni jus okazigis la 17-an Nacian Komitatkunsidon de Kuba Esperanto-Asocio, de la 27-a ĝis la 29-a de januaro, en la gastama urbo Santiago de Kubo. La kunvenejo estis la hotelo Villa Trópico.

Post la jaŭda Interkona Vespero, la laborsesioj komenciĝis per ofera florkrono deponita ĉe la mauzoleo de nia Nacia Heroo José Martí en la tombejo Santa Ifigenia. Skipo de la nacia televido estis en la tombejo kun la celo filmi la omaĝon fare de diversaj oficialaj instancoj, inter ili la Ĉefsekretario de la Partio en la provinco, kiu tuj rekonis nin, kaj rememoris la tempon, kiam li, tiama sekretario de la Partio en Havana Municipo, inaŭguris ekspozicion pri Esperanto. Nia omaĝo al Martí do aperis ankaŭ per la loka kaj la nacia televidoj.

Tri laborsesioj analizis ĝisfunde la Estraran Raporton de la jaro 1999 kaj fiksis la ĉefajn taskojn de Kuba Esperanto-Asocio por la jaro 2000. Denove la unua ĉeftasko rilatas al Informado; gravaj decidoj estis okazigi Nacian Renkontiĝojn en Havano (oktobre) kaj Guantánamo (decembre), Nacian Seminarion pri Informado en Sancti Spíritus fine de septembre, Nacian Seminarion (la 9-an) por Instruistoj en Havano (julie), Infanan Renkontiĝon en Guantánamo (julie) kaj ankaŭ la Seminarion SAEST (Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Havano (maje).

Do, la jaro 2000 montriĝas plenplena je taskoj...



La ĉefsekretario de la Partio en Santiago konversacias kun la komitatanoj

# ENKONDUKO

La jaro 2000 alvenis plena je laboragoj por Kuba Esperanto-Asocio. Jen denove ni, komitatanoj, kunsidas en la urbo Santiago de Cuba por plenumi tiun ĉi devon, analizi la laboron de la ĵus fininta jaro kaj skizi niajn ĉefajn gvidliniojn por la nova periodo. Ni ĵus travivis la dudekan jaron de nia kara Asocio superante malfacilan kaj laborigan procezon kiu envolvis nin ĉiujn en momentoj de streĉeco sed ankaŭ en agrablaj momentoj.La jaro 99 sendube markas etapon de plia maturiĝo por ĉiuj, sed ankaŭ alportis al ni defiojn: en la ĉiutagaĵoj de la administraj taskoj, en la klopodoj daŭre teni la torĉon al ni lasitan de niaj antaŭuloj kaj en la miskomprenoj kaj la ĝojoj de la devo plenumita.
Ni okazigis kun sukceso nian tradician seminarion por instruistoj, nacian renkontiĝon en Camagüey, renkontiĝon en Baracoa kaj la eventon de la komunista kolektivo; ni tamen ne povis okazigi la planitan seminarion en Granma kaj la informfluo kun la filioj ne estis kontentiga; aliflanke, ni konscias pri la streboj faritaj kaj farataj de niaj aktivuloj kaj estraranoj tra la lando, sed kontenteco ne povas esti nia flago.
La rutino nek la vivopremoj devas nin surtreti per pesimismo.Tra la tuta lando estas aro da sindonemaj esperantistoj kiuj daŭre laboras por ke Esperanto estu viva kaj progresu. Nia devo estas konstante lemi, pli altigi nian lingvan kaj kulturan nivelon por esti pli kompetentaj, helpemaj kaj veraj esperantistoj kies Zamenhofa idealo restu viva, nur tiel ni povos altigi nian memestimon kiel esperantistoj kaj la monda esperantistaro daŭre fieros pri nia landa movado.

1. Informado
La jaro 1999 estis markita de la 20-a datreveno de nia asocia ekzisto kaj tiel estiĝis diversaj planoj kiuj fruktedonis pere de rimarkinda informa laboro. Ĉirkaŭ la datreveno, meze de la jaro, ni sukcesis allogi la nacian publikon per la nacia kaj provincaj televizioj, kiu sendube nialande atingas kelkajn milionojn da personoj. Tiu ĉi estis unu el la plej frapaj atingoj de la jaro en la informa fako kiu influis en aliaj aspektoj de la asocia laboro ligitaj al la publiko, kiel la varbado de novaj lernantoj.

***1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafika, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado:*** La regula informado estis ja kontentiga pro la menciitaj kialoj. Oni entreprenis diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj: radio, ĵurnaloj kaj televido kun la valora helpo de Alejandro García, kio alportis tre bonajn rezultojn. Regula informado efektiviĝis per naciaj kaj lokaj radiostacioj: **Progreso**, **Rebelde**, **Reloj Metropolitana**, **Ciudad**, **Radio Havano** (krom la dimanĉaj programoj, oni faris kaj diskonigis kelkajn intervjuojn kaj specialajn programojn, kiel du ***Indagaciones*** kaj tri ***Formalmente informal***), **CMHW** (Villa Clara), **Morón** (Ciego de Avila), **Cadena Agramonte** (Camagüey), **Angulo** (Holguín), **Sancti Spíritus**, **CMKC** (Santiago), kaj aliaj, eĉ reklamo dum kelkaj tagoj pri la lingvo kaj la asocia datreveno. En la nacia televido oni parolis dufoje pri E-o kaj kelkfoje en regionaj kanaloj. Kelkaj ĵurnaloj tra la lando raportis pri tio, eĉ **Granma** inkludis informon ĝuste la 16-an de junio. Oni ankaŭ laboris en la grafika propagando, sed la rezulto ne estis kiel atendite. Kromajn rezultojn ni atingis

per la itinera ekspozicio "Esperanto: Lingvo, Kulturo, Movado", kiun oni prezentis unue en la Nacia Biblioteko, dum la Nacia Kongreso, kaj poste en la municipoj Playa, Arroyo Naranjo kaj Centro Havano. Aldone, la informa agado per retmesaĝoj estis aparte vigla dum la jaro flanke de la koncerna estrarano, kiu dissendis al la plej gravaj E-informcentroj ĉiujn plej gravajn noticojn pri la agado de la Asocio dum la jaro.

***1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o:*** Grava parto de tiu ĉi agado estis farita en la diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Tiurilate, ni devas pli kaj pli emfazi, tiel ke niaj homoj ricevu jen en la aranĝoj, jen en la klasoĉambroj regulan informadon pri tiklaj temoj rilate al la lingvo kaj al la evoluo de la nacia kaj internacia E-komunumo.

***1.3. Garantii la eldonon de* Avanco *(3-foje jare),* La Noktuo *(4-foje),* Universo *(6-foje)* La Fontano *(2),* La Esperanta Perlo *(3),* La Famo *(2),* Antaŭen *(3),* Jajabo *(2) kaj* KeaTur *(3) kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj:*** Rilate la asociajn organojn, ni sukcesis en la kazo de **Avanco**, sed ne pri **La Noktuo** kaj **Universo.** Pro diversaj kialoj, ĉefe ligitaj al la redaktoro: la redakto, fineldono kaj publikigo de tiu ĉi du lastaj tro prokrastiĝis kaj, fine, ili du nur aperis unufoje en la jaro, kontraŭ la 4 kaj 6 respektivaj planitaj numeroj. Kompreneble, la respondeculo pri tio, Juan Ramón Rodríguez, dufoje en la jaro vojaĝis eksterlanden kaj entute restis for de la lando kvar monatojn; krome, kunordigoj kaj manko de laborfortoj ankaŭ malhelpis tiurilate. Pro la graveco de la menciitaj informiloj, ilia ne publikigo signifis perdi eblecojn diskonigi la asocian agadon kaj, samtempe, ne sufiĉe nutri la movadanojn pri tiu ĉi riĉenhava kaj fruktodona jaro.

***1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro:*** Tradicie ni havas kiel laboraspekton iel stimuli la esperantistojn kontribui al apero de KEA en la internacia E-gazetaro; sed, dum la jaro 99, tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla, malgraŭ la aktiva laboro de Alberto García Fumero. Tiurilate, menciindas la laboro de Fernando Paredes, kiu aktive kunlaboras kun la gazeto **Internaciisto** kaj José Luis Montes de Oca kun la **Vegetarana Revuo.** Tamen, potencialo estas pli alta kaj ni devas alvoki aliajn talentajn esperantistojn pli aktivi en tiu agadkampo.

***1.5. Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn:*** Rilate la hejmpaĝon de KEA en internet, daŭre estis atentata de García Fumero kaj aktualigata rilate eventojn de la jaro. Ĝi estas vizitata de esperantistoj tra la mondo kaj certe kontribuas al informado pri la ekzisto de KEA nacie kaj internacie.

**2. Naciaj kaj internaciaj eventoj**

***2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 20-a datreveno de KEA*:** Laŭ konkretaj kondiĉoj la filioj organizis diversajn aranĝojn kaj ankaŭ diskonigis ilin. La centra aranĝo estis organizita en Havano kun la provinca filio.Oni profitis la okazon por agnoski la laboron de elstaraj aktivuloj kiuj tra la tuta lando konstante laboris por la Asocio. La okazo estis bone uzita ekde informa vidpunkto kaj ni konsideras ke estis bona momento en la vivo de KEA. Oni faris specialan ŝtampadon de koverto omaĝe al la 20-a datreveno de la Asocio.

***2.2. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Camagüey*:** La nacia renkontiĝo okazis tre sukcese kaj pri ĝi oni raportis en **Avanco**. Partoprenis reprezentantoj el diversaj provincoj kaj oni povis analizi temojn rilate al edukado kaj kulturo.La esperantistoj en Camagüey tre organizite kaj serioze laboris por garantii la plenan sukceson de la evento kiu sendube imitindas.Kulturaj institucioj ankaŭ estis envolvitaj en la evento kaj kontribuis al eksteriĝo de la asocia influo en la teritorio.Tiaj renkontiĝoj devas esti daŭraj pro tio ke ili stimulas la lokan movadon kaj estas fonto de inspiro por la esperantistaro.

***2.3. Okazigi Nacian Seminarion pri Instruado kaj Informado en Granma*:** La seminario planita pri instruado kaj informado ne okazis pro diversaj kialoj, sed esence pro manko de intereso far la partoprenontoj, kio konsistigas sperton por la estonteco.Oni laboris en preparado de kondiĉoj surloke, sed aliaj filioj ne reagis rilate al partopreno.Ni devas sekvi pli kompromisan principon tiurilate.

***2.4. Atenti la okazigon de IKEK konferenco en Urbo Havano en decembro 1999:*** La 12-a Konferenco de IKEK okazis sukcese danke al laboro de la preparkomitato. La evento estis tre laboriga pro la konsisto mem de la Konferenco; tamen, ni havis la subtenon de la Komunista Partio kaj de la Ministerio pri Kulturo pere de la eldonejo José Martí kaj speciale ties direktorino, Cecilia Infante. Je la fino, Ikek-anoj kaj partoprenantoj esprimis sian kontenton pro la konferenco, kiu sendube estis plia sukcesa paŝo en la laboro de la asocio.

**3. Disvastigo tra la lando kaj reviGligo de filioj**

Nia ĝenerala plano ĉirilate estis grandparte plenumita, foje pli bone, foje ne kiel atendite, sed en aliaj kazoj tre bone. Temas pri konstanta asocia bezono kreskigi kaj disvastigi la movadon, malgraŭ tio ke ne ĉiam ni sukcesu en difinita periodo, kio neniel povas malentuziasmigi nin, sed male instigi nin al konstanta semado. Tamen, ni konsideras tre valoraj la atenton kaj vizitojn al filioj dum la jaro, ĉar pere de ili la naciaj estraranoj havis la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la esperantistoj tra la lando.

***3.1. Labori por revigligi la movadon en tiuj teritorioj kun jara personeco. Villa Clara:*** Dum la periodo, la agado en tiu ĉi filio estis unu el la plej bonaj kompare kun antaŭaj jaroj, sufiĉe avancis kaj kreskis, ĉefe danke al la sindonema kaj sindediĉa loboro de sinjoro José L. Montes de Oca, kiu konstante laboris je tiu celo. Ĉimomente, aktivas tie tri municipoj: Santa Clara, Santo Domingo kaj Sagua la Grande. La V-a Kunsido de la Centra Komisiono sesiis en la provinca ĉefurbo dum majo, kun sufiĉe bonaj rezultoj, kaj montris inter aliaj aferoj la bonegajn publikajn rilatojn ekzistantajn surloke. Nuntempe, la perspektivoj tie montriĝas bonaj por la progreso de la laboro. ***Havano:*** En la kazo de Güines, malgraŭ la kurso instruita tie dum longa tempo far la sinjoro Julián Hernández, la rezultoj ne estis tiel bonaj kiel atendite, kaj nuntempe ni ne konas pri la agado surloke. Rilate al Quivicán, la grupo pretas aktivi; komence de la jaro, nacia estrarano vizitis la municipon kaj klopodis helpi iamaniere, sed ĝis nun konkretajn rezultojn oni ne vidas. Pri Santa Cruz del Norte, nur hazardajn informojn ni ricevis pri vivanteco de loka infangrupo, sed tio nun ne funkcias laŭ lastaj informoj ricevitaj.

***3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Las Tunas, Holguín, Cienfuegos, Pinar del Rio kaj Isla de la Juventud: Matanzas:*** Ni ne sukcesis kreskigi la movadon de Pedro Betancourt al aliaj teritorioj, kaj en tiu municipo mem ĝi ne stabilas, tamen menciindas la laboro regule farata kun lernejanoj en E-rondo, ekspozicioj kaj aliaj aranĝoj ligitaj al la infanaro. ***Las Tunas:*** La loka grupo daŭrigis sian agadon dum la periodo sufiĉe bone organizita; tamen, malgraŭ malfermi kurson kaj labori stabile dum la tuta jaro, ĝi ne sukcesis kreskigi la membraron. Laŭ la kontrolvizito de nacia estrarano kaj aliaj kontaktoj, ni konsideras ke surloke eblas pliampleksigi la laboron eĉ kum pliaj rezultoj. ***Holguín:*** La laboro en tiu orienta filio daŭrigas pli malpli sama al 1998, ĉar ne malkreskis, sed samtempe ne kreskis; tamen, menciendas la laboro de Isnel Pupo per sia pupteatro tra la komunumo, kio iel sukcesis teni vigla la grupon tie kaj, verŝajne, la ebleco resti kiel organizita grupo estas reala. ***Cienfuegos:*** En la celo kreskigi kaj fortigi la movadon oni parte sukcesis, unue ĉar la estrara teamo bone aranĝis la aferon sub la gvido de Vergel; kaj due, iom post iom kreskis la kvanton da pkk-anoj, sed dum la dua semestro la informoj ne fluis kiel kutime. ***Pinar del Río:*** Delonge la Nacia Estraro laboras por eknaskigi novan grupon en la pli okcidenta provinco, sen konkretaj rezultoj. La baptopatroj kelfoje intencis trovi vojojn tiucele, sed nur fine de la jaro, dank' al la kroma laboro de la havanano Amado Guerra oni trovis kelkajn interesitojn pri la lingvo, kiuj espereble ekkomencos kurson dum la unua trimestro 2000. ***Isla de la Juventud:*** La laboro farita dum la unua semestro de la jaro, sub la gvido de sinjoro Manuel Castillo, celante revigligi la movadon tie, permesis malfermi kurson kun 12 gelernantoj en la dua semestro. Ĉio daŭrigas sen problemoj, eĉ kun du instruistoj por la venonta kurso. Krome, ili jam pretas malfermi specialan kurson en Cayo Largo.

**4. Organizaj demandoj kaj interna administrado**

Dum 1999, la situacio rilate al organizado kaj interna administrado montriĝis sufiĉe stabila. Ni regule devas insisti pri la bezonoj ke la filioj plibonigu siajn respektivajn kontrolojn kaj estu pli akurataj en la sendado de membrokontrolo, kotizo, kotizkvitancoj, protokoloj kaj aliaj informoj. Ni devas mencii ke la plej akurataj filioj tiusence dum la periodo estis Camagüey kaj Granma, ankaŭ menciindas la reguleco en la informo de Sancti Spíritus, kiu estis la sola kiu raportis laŭ trimestroj, dum la ceteraj tion faris iom lante kaj ofte po partoj aŭ preskaŭ faris nenion, kio ne kontribuis al bona tutlanda organizo en tiu aspekto. Bezonatas ankoraŭ plibonigi tiun ĉi agadon kaj finaranĝi la ĝeneralan uzon de la nacia modelo por kontrolo de la membraro, la koncernajn kotizkvitancoj kaj ties kongruo kun la membrokontrolo, tiel ke oni povu pli travideble havigi al si la plej fidindan informon pri niaj membroj dum la diversaj periodoj de la jaro.

***4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo:*** La plimulto de la filioj dum la jaro ne sendis ĝustatempe la membro-kontrolojn kaj la koncernajn kotizojn kaj kotizkvitancojn, kaj en kelkaj kazoj tiuj malfruaj informoj alvenis al la NE kun malkongruoj aŭ kun mankoj de kelkaj bezonataj aferoj, kiuj krome malhelpis. La plejbona filio en tiu ĉi aspekto dum 1999 estis Granma. Ni ne povas atendi ĝis la lasta momento por koni la realon ĉar tio estas malavantaĝo por nia daŭra laboro. Ĉiuj devas gajni akuratecon tiusence.

## STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO/1999*

| FILIO | 1-a SEMESTRO | 2-a SEMESTRO |
|---|---|---|
| I. de la Juventud | 2 | 14 |
| Pinar del Río | - | - |
| Havano | - | - |
| U. Havano | 96 | 93** |
| Matanzas | - | 21 |
| Cienfuegos | 12 | 14 |
| Villa Clara | - | 47 |
| Sti. Spíritus | 11 | 12** |
| C. de Avila | - | - |
| Camagüey | 153 | 100 |
| Las Tunas | 11 | - |
| Granma | 23 | 27 |
| Holguín | - | - |
| Stgo. de Cuba | 112 | 100** |
| Guantánamo | 16 | 42 |
| Ĉe Nacia Estraro | 11 (pkk)*** | 11 (pkk)*** |

NOTOJ:

*Tiu ĉi statistiko rekte rilatiĝas kun la kotizantoj.

**Inkludas la pkk-anoj de tiu teritorio.

***Rekte kontrolitaj de la NE.

***4.2. Atento kaj vizitoj al filioj:*** Dum la jaro, la atento al filioj estis plenumata pere de diversaj rimedoj, nome kontrolvizitoj, leteroj, protokoloj kaj telefonado. Ni faris plurajn vizitojn al provincoj: kelkaj al Güines (Havano) kaj Pinar del Río, tri al Santiago kaj Camagüey, du al Granma kaj Guantánamo, kaj unu al Villa Clara, Sancti Spíritus, Las Tunas kaj la MF Quivicán. La kontaktoj kun Holguín, Matanzas, Cienfuegos, Isla de la Juventud kaj Ciego de Avila estis ĉefe personaj (dum iliaj vizitoj al U. Havano), telefone kaj letere.

***4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj:*** Oni kontrolis ĉiujn membrojn subtenantojn tra la lando kaj sendis la unuan eldonon de **Avanco**; tamen, ni konsideras ke ĉi agado ne estis sufiĉa: mankis daŭraj kontaktoj je nia flanko kaj tio vere malhelpas la agadon de la Asocio, ĉar ju pli ni atentos ilin des pli da ili ni havos.

***4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon:*** Ĉikaze, ekde la komenco de la jaro, ni pro diversaj kialoj kontaktis ilin telefone, persone aŭ letere; kaj, samtempe, la NE sendis ĉiam al ili la monatajn protokolojn kaj raportojn pri la kontrolvizitoj. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko de ĉiu estrarano.

### 5. Publikaj rilatoj

Niaj publikaj rilatoj ĝenerale stabilis dum la tuta jaro, kaj oni faris plurajn kontaktojn okaze de niaj aranĝoj naciaj kaj regionaj, kio devas resti kiel principo kaj tiucele oni devas pli

regule tion fari kaj poste flegi la jam faritan kontakton.

***5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiuj nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble:*** La rilatoj kun politikaj, registaraj kaj aliaj instancoj je ĉiu nivelo estis konstante flegataj nacie kaj loke far la filioj, inter aliaj: la kultura fako de la Komunisma Partio, ministerioj pri Kulturo kaj Justico, ktp, kvankam bezonatas pli da kunlaboro farebla laŭ permanenta maniero. Kun la rilatorgano, regule okazis kontaktoj, speciale okaze de la Konferenco de IKEK, sed ni devas labori por ke estonte tia laboraspekto fariĝu ne nur informa de ni al ili, sed iamaniere pli kunlabora.

***5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo:*** Niaj ligoj kun la kultura vivo de la teritorio daŭrigis kaj plifortiĝis kun kulturdomoj, bibliotekoj, kelkaj komunumoj kaj aliaj kulturaj instancoj, kvankam tio ankoraŭ plibonigendas ekde diversaj vidpunktoj kaj survoje al pli altaj atingoj. Tia agado bezonas pliajn konkretajn projektojn por vera efektivigo.

***5.3 Rilate al aliaj asocioj kulturklerigaj, UNESCO kaj UNO-Asocio; laŭeble iniciati konkretan kunlaboron:*** Dum 1999, ni atingis pli fortajn kontaktojn kun kelkaj kulturklerigaj asocioj. Krom la Eldonejo José Martí (nia rilatorgano), ni sukcesis ampleksigi nian interrilatan laboron kun UNO-Asocio kaj UNESCO-Komisiono. Alifoje kunordige kun Unuiĝintaj Nacioj, KEA organizis simpozion pri la temo "La UN-Sistemo kaj Esperanto". Meze de la jaro, oni prezentis al UNESCO projekton por disvastigo de la E-agado en la kariba regiono, kies rezultojn ankoraŭ ni atendas. Nia Asocio, krome, partoprenis la Kariban Festivalon en Santiago de Cuba. Aliaj kontaktoj ekkomencis kun la Kariba Asocio, sed ĝis nun ne estis fruktodonaj.

**6. Financoj**

Tiu ĉi laborfako estis esence transformata dum la jaro 99 surbaze de la rekomendoj faritaj de la aŭditora kontrolo okazinta fine de 1998. Oni dungis librotenistinon kiu kune kun la sekretariino pri financoj restrukturis la tutan librotenan sistemon de la Asocio, oni faris inventariojn de nemoveblaĵoj kaj ceteraj asociaj posedaĵoj. Temas pri tre laboriga tasko kiu estas sukcese plenumita kaj ebligas al ni konsideri ke la ĉefaj rekomendoj estis faritaj. La spertoj en tiu ĉi direkto permesis krome kontroli, helpi kaj asesori pliefike la agadon en la filioj. La Nacia Estraro faris financan reviziadon en tri grandaj provincaj filioj (Camagüey, Santiago de Cuba kaj Urbo Havano), du municipaj filioj (Bayamo kaj Centro Havano) k. la MG Guantánamo. Laŭ niaj konkludoj, inter la unuaj, la plej organizita estas Camagüey; inter la duaj, Bajamo kaj Guantánamo. Ankoraŭ mankas solvi malgrandajn aferojn en kelkaj filioj pri kio nuntempe ni laboras. La NE ricevis du kontrolvizitojn de la Komisiono pri Financo elektita de la Nacia Komitato kaj ili taksis la laboron bona.

***6.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj:*** La administraj taskoj plenumitaj dum la jaroj koncentriĝis en la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la nacia sidejo de KEA, kiu dum la jaro plenumis diversajn servojn al interesitoj, vizitantoj kaj esperantistoj

de en- kaj eksterlande. Oni devis ekde financa vidpunkto reordigi la administran laboron, atenti la laboristojn kaj aliajn taskojn de la interna funkciado. Tiurilate, oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj tra la CO, tamen oni elstarigu la laboron de la komisiito pri administrado, Alberto Rodriguez; kaj de la sekretariino pri financoj, Marta Alonso, kiuj kunlaboras por ke nia sidejo ekde administra vidpunkto daŭre plenumu sian celon.

***6.2. Fiksi strategion por plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj:*** La jara bilanco montras la funkciadon de nia buĝeto. Evidentiĝas ke niaj rimedoj en nacia valuto havas fortan deficiton pro la reala situacio travivata tutlande, unuflanke, kaj pro la forta elspezado okazigita de la Nacia Kongreso.La situacio en forta valuto kondutas modeste profita, kio sendube firmigas la strategion sekvatan ĝis nun. (Vidi la koncernajn bilancojn.)

***6.3. Aktivigi Financan Komisionon por regula inspektado je ĉiuj instancoj asociaj:*** La Financa Komisiono funkciis dufoje laŭstatute. Tiurilate oni devas prizorgi ke la laboro estu pli kaj pli kvalita kaj kompletigi la Komisionon tiel ke ĝi kontribuu al plibonigo de la financa fako.

***6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj:*** Dum la jaro 99 oni vizitis diversajn filiojn kun la celo fari kontrolvizitojn pri financa laboro. La celo estis kune agadi por etendigi al la filioj la rekomendojn ricevitajn pri librotenado kaj aliaj fakaj aferoj. Menciindas la laboro tiurilate de Camagüey, Granma kaj Guantánamo. Diversaj rekomendoj estis faritaj kaj evidentiĝas ke la laboro devas esti daŭra. La filioj ĝenerale konscias pri la bezono memfinanci la koncernan agadon kaj tiusence ni devas ankaŭ konstante labori.

**BILANCO 1999 (CUP)**

| Koncepto | Buĝeto | Akumulita | % | Disponebla |
|---|---|---|---|---|
| Enspezoj | | | | |
| 1- kotizo | 6000.00 | 2640.95 | 44 | |
| 2- Libroservo | 4500.00 | 4174.40 | 93 | |
| 3- Aliaj servoj | 33000.00 | 42326.35 | 128 | |
| 4- Ikek | | 3910.00 | | |
| **Totalo** | **43500.00** | **53051.70** | **122** | |
| Elspezoj Centra Oficejo | | | | |
| 1- Imposto | 8500.00 | 10920.67 | 128 | -2420,67 |
| 2- Salajro | 19200.00 | 15404.96 | 80 | 3795.04 |
| 3- Eldonagado | 250.00 | 464.21 | 186 | -214,21 |
| 4- Gaso | 300.00 | 318.24 | 106 | -18,24 |
| 5- Riparoj diversaj | 300.00 | | | 300.00 |
| 6- Sideja ilaro | 400.00 | 1040.99 | 260 | -640,99 |
| 7- Investoj por servoj | 500.00 | 4472.00 | 894 | -3972,00 |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 8- Pošto | 600.00 | 793.74 | 132 | -193,74 |
| 9- Telefono | 2000.00 | 3133.93 | 157 | -1133,93 |
| 10- Bankservoj | 120.00 | 164.00 | 137 | -44,00 |
| 11- Elektro | 900.00 | 767.87 | 85 | 132.13 |
| **Totalo** | **33070.00** | **37480.61** | **113** | **-4410,61** |
| **Nacia Estraro** | | | | |
| 1- Komitatkunsido | 3000.00 | 4025.00 | 134 | -1025,00 |
| 2- Kontrolvizitoj | 2500.00 | 3507.95 | 140 | 1007,95 |
| 3- Naciaj eventoj | 500.00 | | | 500.00 |
| 4- Publikaj rilatoj | 500.00 | 395.00 | 79 | 105.00 |
| 5- Kongreso | 2000.00 | 13281.16 | 664 | -11281,16 |
| 6- Estrara rezervo | 500.00 | 705.00 | 141 | -205,00 |
| 7- IKEK | | 2705.57 | | -2705,57 |
| **Totalo** | **9000.00** | **24619.68** | **274** | **-15619,68** |

| | |
|---|---|
| **Saldo 31/12/1998** | **14650,38** |
| Enspezoj | **53051.70** |
| Elspezoj (C. Oficejo) | **37480.61** |
| Elspezoj (N. Estraro) | **24619.68** |
| **Saldo 31/12/99** | **5601,79** |
| En banko | **3601,79** |
| En Kaso | **2000,00** |

**BILANCO 1999 (USD)**

| Koncepto | Buĝeto | Akumulita | % | Disponebla |
|---|---|---|---|---|
| **Enspezoj** | | | | |
| 1- Kotizo | 1300,00 | 2292,00 | 176 | |
| 2- kurso | 10500,00 | 12696,18 | 121 | |
| 3- Libroservo | 2000,00 | 897,15 | 45 | |
| 4- Aliaj servoj | 3000,00 | 4290,00 | 143 | |
| 5- Subvencio UEA 3a NK | 1500,00 | 1500,00 | 100 | |
| 6- IKEK | | 5765,00 | | |
| **Totalo** | **18300,00** | **27440,33** | **150** | |
| **Elspezoj** | | | | |
| **Centra Oficejo** | | | | |
| 1- Imposto | 1320.00 | 675,34 | 51 | 644,66 |
| 2- materialo por oficejo | 500.00 | 282,40 | 56 | 217,60 |
| 3- Eldonagado | 1500.00 | 304,08 | 20 | 1195,92 |
| 4- Teknikaj rimedoj | 600.00 | 251,75 | 42 | 348,25 |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 5- Riparoj diversaj | 1300.00 | 25,00 | 2 | 1275,00 |
| 6- Ilaro por sidejo | 500.00 | 247,20 | 49 | 252,80 |
| 7- Investoj por servoj | 1900.00 | 3983,60 | 210 | -2083,60 |
| 8- Transporto/bencino | 900.00 | 391,56 | 43 | 508,44 |
| 9- Telefono | 800.00 | 360,00 | 45 | 440,00 |
| 10- Atento al vizitanto | 850.00 | 1030,00 | 121 | -180,00 |
| 11- Bankservoj | 40.00 | 30,00 | 75 | 10,00 |
| **Totalo** | **10210.00** | **7580,93** | **74** | **2629,07** |
| **Nacia Estraro** | | | | |
| 1- Komitatkunsido | 300.00 | 332,70 | 111 | -32,70 |
| 2- Kontrolvizitoj | 100.00 | 49,50 | 50 | 50,50 |
| 3- Naciaj eventoj | 100.00 | | | 100,00 |
| 4- Internaciaj eventoj | 3000.00 | 5535,56 | 185 | -2535,56 |
| 5- Atento al filioj | 200.00 | 22,25 | 11 | 177,75 |
| 6- Publikaj rilatoj | 100.00 | 207,80 | 208 | -107,80 |
| 7- Kongreso | 3000.00 | 3582,72 | 119 | -582,72 |
| 8- Estrara rezervo | 200.00 | 720,30 | 360 | -520,30 |
| 9- IKEK | | 5063,31 | | -5063,31 |
| Totalo | **7000.00** | **15514,14** | **222** | **-8514,14** |

| | |
|---|---|
| **Saldo 31/12/98** | **2026,02** |
| Enspezoj | **27440,33** |
| Elspezoj (C. Oficejo) | **7580,93** |
| Elspezoj (Nacia Estraro) | **15514,14** |
| **Saldo** | **5371,28** |
| En banko | **4871,28** |
| En Kaso | **500,00** |

**7. Instruado**

Dum la jaro, la laboro de la Asocio en tiu ĉi grava kampo estis kontentiga laŭ la informoj ricevitaj kaj la personaj kaj telefonaj kontaktoj ĉirilate; kvankam, kiel ĉiam, estas provincoj kiuj elstaras pro la rezultoj de la ĉiesflanka stabila laboro en rilatoj kun la kursoj mem kaj ekde informa vidpunkto. Tiu estas la kazo de Urbo Havano, Villa Clara kaj Camagüey. En la kazo de Santiago de Kubo, ni povas diri la samon nur en rilato kun la perkoresponda kurso.

***7.1. Regulaj kursoj:*** Oni povas konstati ke ankoraŭ ni devas multon fari por sukcesigi niajn regulajn kursojn tutlande eĉ en tiuj provincoj kie tradicie oni havis tre bonajn rezultojn, kaj ankoraŭ multe pli por sendi ĝustatempe la koncernajn informojn, tiel ke oni povu pli bone kaj pli ĝuste bildigi la laboron de la filioj.

***7.2. Kreskigi la PKK-n kaj atenti ties partoprenantojn diversmaniere:*** Laŭ niaj kontroloj, la Asocio ne vere plenumis tiun ĉi taskon, escepte Urbo Havano. Dum la jaro, nur enskribiĝis 21 interesitoj kaj el ili nur daŭrigis 9, kun rekta atento de la Centra Oficejo,

krom la 13 daŭrigantoj sub la gvido de Santiago de Cuba. Tio indikas ke ni ĉiuj malbone agadis en rilato kun la PKK, malgraŭ havi novajn eblecojn por plifortigi ĝin tra la lando. Ni konscias, ekzemple, ke la PF Sancti Spíritus intencis kunsidi kun la pkk-anoj, sed ankaŭ la rezultoj estis ne kontentigaj. Ni devas fiksi novan strategion por sukcesigi la PKK-n.

***7.3. Okazigi provincajn seminariojn por altigi la lingvan kaj kulturan scipovon rilate al E-o:*** La provincaj seminarioj efektive ne okazis dum la periodo, kun la escepto de Urbo Havano, kiu organizis kelkajn, eĉ por instruistoj. Tio evidentigas ke tiusence ni devas plu labori por stimuli kaj krei la bezonatajn kondiĉojn por ties realigo; same indas profiti pli kunordige la vizitojn de estraranoj al filioj por kunsidi kaj prepari tiajn klerigajn seminariojn aŭ simile.

***7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: Distanca Kurso, konkursoj, prelegoj,..:*** Certe la plimulto de la filioj ne profitas ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de la esperantistaro. Taŭgaj kontaktoj kun la membraro tra la lando permesas konstati tion. Mankas iniciatoj kaj postuloj en kelkaj filioj por tion fari. Oni devas ŝanĝi la sintenon en tiu celo aŭ neniam ni havos movadon sufiĉe fortan kaj kapablan ekde lingva kaj kultura vidpunktoj. Elstaras pro la altvalora laboro ĉisence la PF Urbo Havano, kiu dum la periodo organizis semajnfinajn konversaciajn seminariojn, prelegojn, forumojn, simpoziojn kaj konkurson, kun efikaj rezultoj por la partoprenintoj. Aliflanke, la Distanca Kurso stagnas naciskale, ĉefe pro manko da propagando kaj serioza laboro tiurilate. Tutcerte ekzistas personoj kiuj delonge sendis siajn taskojn kaj la koncerna respondeculo pri tio ne resendis novajn taskojn atendinte havi grupon da respondoj kaj tio, kompreneble, malhelpis la daŭrigon de tiu kurso.

***7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj:*** Omaĝe al la Tago de la Instruisto kaj ankaŭ okaze de la nova jaro, oni sendis gratulkartojn al nia tuta instruantaro, kiel modesta agnosko al la laboro sindediĉe kaj sindoneme de ili farita. En la internacia sfero, nia Kuba ILEI-Sekcio estis reprezentata pere de tri el iliaj membroj en la 33-a ILEI-Konferenco. Krome, niaj ILEI-anoj ricevis la lastan eldonon de ***Saĝa sago***.

***7.6. Nacia Seminario por Instruistoj:*** De la 1-a ĝis la 4-a de julio 1999, ni organizis la jam tradician Nacian Seminarion por Instruistoj (la okan). Partoprenis ĝin 11 geinstruistoj el diversaj filioj. Dum la Seminario, oni prelegis, prezentis modelajn lecionojn kaj interŝanĝis spertojn. Kiel en la antaŭaj jaroj, oni taksis ĝin sukcesa, laŭ la opinioj de la partoprenantoj. Ĉiam pli kaj pli ni klopodas alĝustigi kaj perfektigi ilin tiel ke ili plenumu sian celon.

**8. Kulturaj kaj klerigaj aranĝoj**

Ni konsideras ke la kultura laboro tra la lando dum 1999 estis pli bona ol en 98, tamen plibonigenda. Pri la afero de kulturo, regule sendis informojn Villa Clara, Cienfuegos, Camagüey, Sancti Spíritus kaj Urbo Havano; neregule, Granma, Guantánamo kaj Holguín; kaj neniam informis Matanzas, Santiago de Cuba kaj Las Tunas.

***8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj:*** Konstante la membroj de la NE kaj kelkaj estraranoj kaj

aktivuloj tra la lando klopodas pli kaj pli levi la konscion de nia membraro pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado, profitante la diversajn E-aranĝojn por priparoli tiujn temojn, okazigi konkursojn kaj krei la etoson taŭgan en niaj renkontiĝoj kaj eventoj por pli altigi ilian kulturan nivelon (la plej bona ekzemplo en rilato kun tio estas Urbo Havano). Kompreneble, tio ne ĉiam okazas ĉie kaj multe pli ankoraŭ ni devas fari por ke la membraro en la filioj profitu ĉiujn eblajn momentojn kaj ekspluatu siajn kapablecojn. Kelkfoje, la filioj paneas tiusence kaj nur dum kontrolvizitoj kaj renkontiĝoj organizas ion. Dum la periodo, oni liveris du konkursojn: pri historio ("XX-a Datreveno de KEA") kaj eseoj, sed neniu partoprenis. Naciskale la tuta esperantistaro devas pli profiti la rezultojn de la konstanta laboro de la Komisiono pri Historio, sed ankaŭ ekzistas aliaj eblecoj.

***8.2. Flegi la kulturan aktivadon de la filioj kaj provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele:*** Dum la jaro, oni flegis konstante la kulturan aktivadon de la filioj kaj ofte provizis ilin per diversaj materialoj taŭgaj por riĉigi la kulturajn eblecojn. Konstanta tasko de Kulturo estas garantii monatajn aranĝojn en la diversaj filioj, ankaŭ en la Nacia Sidejo. Kelkaj filioj faras aranĝojn en kulturdomoj kaj en la komunumoj, sed ankoraŭ mankas organizi pli ofte kulturklerigan etoson celante ke la membraro montru sin kaj altigu sian nivelon ekde lingva, historia kaj kultura vidpunkto en rilato kun Esperanto.

***8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn:*** Tiu ĉi afero marŝas, sed ankoraŭ estas plibonigenda rilate la malmultajn profesiajn artistojn kiu kunlaboras kun la Asocio ĉar tio garantios pli altnivelajn kulturajn prezentojn. Rilate al varbado de novaj, la agado ne estis regula; tamen, kiel rezulto de la Kultura Festivalo kaj kun la celo partopreni en la 3-a Nacia Kongreso, kelkaj filioj multe plibonigis la rilatojn kun amatoraj kaj profesiaj aristoj, kiel ekzemple Urbo Havano, Guantánamo, Santiago de Cuba kaj Granma, kiuj montras tre bonaj perspektivoj en tiu.

***8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj:*** Dum 1999, nia kultura fako iomete pli emfazis sian agadon en la bezonata reprezentiĝo de KEA en eksterasociaj kulturklerigaj eventoj, kiel necesa konstanta laboro, tiel ke ĝi kontribuos pli altigi la prestiĝon de la Asocio kaj Esperanto kiel lingvo, kio devas esti aktiva parto de niaj taskoj. Elstaris la partopreno en la simpozio "La UN-Sistemo kaj Esperanto", en kunordigo kun Unuiĝintaj Nacioj.

***8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas:*** Ne sufiĉas ke ĉe la Nacia Sidejo de KEA ekzistu unu el la plej riĉaj kolektoj da libroj en nia kontinento, kiam la plejmulto de nia membraro preskaŭ ne interesiĝas pri tio. De antaŭ du jaroj, eblas pruntedoni librojn al kiu ajn interesito tra la lando kaj, ĝis nun, nur kvar personoj el Guantánamo k. Santiago de Cuba kaj aliaj 13 el U. Havano pruntepetis librojn. En1999, oni nur pruntedonis tie 17 librojn al naŭ havananoj kaj santiaganino. Krome, en kelkaj urboj estas stokoj da E-libroj en la provinca aŭ loka biblioteko, sed la esperantistoj ne uzas ilin. Kompreneble, la uzado de tiuj kolektoj dependas ankaŭ de nia kapablo stimuli nian membraron pli legi. Dum la jaro, oni muntis E-libroekspoziciojn en la municipoj Cienfuegos, Santa Clara, Santo Domingo, Playa, Arroyo Naranjo kaj Centro Havano, kaj en la Nacia Biblioteko dum la 3-a Nacia Kongreso.

***8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn:*** Dum la restado de esperantistoj en kampadejoj kaj regionaj renkontiĝoj, oni multe profitis la okazon montri kaj eksterigi nian kulturon; tiel multaj ne esperantistoj konas pri la agado de nia Asocio. Dum la jaro, la partopreno estis pli aktiva ol pasintan jaron, ĉar multaj kamaradoj aktive agis legante poemojn, kantante; tiel oni pliriĉigis la enhavon de la programo; en multaj el ili partoprenis eksterlandaj vizitantoj. Do, la kulturaj eventoj estis farataj laŭplane kaj tiusence ni devas ankoraŭ pli insisti en la kvalita preparo de la kulturaj eroj en ĉiuj regionaj renkontiĝoj, tiel ke ili fariĝu veraj kulturaj momentoj per kiuj la esperantistoj pli konatiĝu kun la E-kulturo.

***8.7. Kontroli, zorgi k. atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la 20-a datreveno de KEA:*** Okaze de la XX-a datreveno de KEA, oni organizis kaj aranĝis kulturajn renkontiĝojn naciskale. La Centra Aranĝo okazis en la Astura Centro en Urbo Havano kun pli ol 100 personoj, kie partoprenis Cecilia Infante, direktorino de la Eldonejo José Martí; kaj Jesús Guerra, specialisto de la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu ĉi lasta institucio, kunordige kun KEA, omaĝis nian Asocion per la simpozio "La UN-Sistemo kaj Esperanto", kie Juan Ramón Rodríguez prezentis samnoman prelegon, Julián Hernández kaj Héctor Jiménez kantis kelkajn kanzonojn, oni faris specialan ŝtampadon, malfermis ekspozicion kun esperantaĵoj, kaj Maritza Gutiérrez (nome de la Asocio) ricevis la Medalon 50 Datreveno de la ACNU.

## 9. Internaciaj rilatoj

***9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj aliaj E-institucioj:*** Dum 1999, ni daŭrigis niajn regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj kaj lokaj asocioj. Dum februaro, la Asocio estis reprezentata en la 4-a Tutamerika Kongreso en Bogoto, pere de Juan Ramón Rodríguez, kiu persone kontaktis kun la delegitoj el norda, centra kaj suda ameriko, kaj poste trairis Kolombion kaj interŝangis surloke kun diversaj kluboj. Meze de la jaro, Maritza Gutiérrez, Pedro Fernández kaj Julio César Tamayo reprezentis la Asocion en la 84-a Universala Kongreso, en Germanio, kaj en la 33-a ILEI-Konferenco, en Ĉeĥio. Krome, Carmen A. Hernández, Roberto Torres kaj Alexis Otero partoprenis la UK-on, kaj kelkaj el ili ĉiuj prelegis pri diversaj temoj, eĉ en Belgio. Je la fino de la jaro, Mayra Núñez kontaktis en Eŭropo kun geesperantistoj de Belgio, Nederlando kaj Francio; nia Ĝenerala Sekretario prelegis esperantlingve en kluboj de Anglio, Belgio, Nederlando kaj Francio, kontaktis persone kun la prezidanto de la Komisiono pri Ameriko, kaj partoprenis la Malferman Tagon de UEA, en Roterdamo, kie agadis favore al la Asocio kaj parolis kun elstaruloj de la internacia E-movado, kiel J. Tonkin, J. Wells, D. Blanke, R. Corsetti, ktp, kiuj multe interesiĝas pri nia lando, ekde diversaj vidpunktoj. Fine de decembro, Roberto Cutiño prelegis en Belgio, Nederlando kaj Germanio. Enlande sukcesis la realigo de la Internacia IKEK-Konferenco. Do, sufiĉe multaj kontaktoj kaj rilatoj kiuj plenumas tiun ĉi taskon. Sed, ankaŭ, ni sendis la asociajn organojn al ĉiuj kontinentoj, el kiuj iom post iom oni ricevis samtempe iliajn informilojn. Al tio aldonendas, nia laboro eksterlanden per la elektronika poŝto.

***9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo:*** Oni daŭre esprimis la pretecon konkretigi kunlaboron kun Meksika E-

Federacio, sed tio ne konkretiĝis ĝis nun, malgraŭ la persona parolado inter Juan Ramón kaj Leonora Torres, en Bogoto. Tamen, aliaj kontaktoj tie permesis transdoni al ili niajn spertojn kaj ideojn, inviti la instruistojn partopreni nian Nacian Seminarion en tiu kampo kaj oficiale peti la sidejon de la 6-a Tutamerika Kongreso. Krome, meze de la jaro, KEA prezentis al UNESCO-Komisiono kulturan projekton pri la etendigo kaj plifortigo de la poresperanta agado en la kariba regiono. Ofte aperas informoj pri nia movado en la regiona informilo kaj multaj personoj interesiĝas pri nia agado ĉi tie, eĉ pri la ebleco vojaĝi al nia lando, aŭ simple lerni ĉi tie.

## 10. Faka agado

Ĉi jare la komisiito pri Faka Agado partoprenis la UK-on en Germanio, kie ŝi profitis la okazon por propagandi kaj diskonigi la agadon de la medicinistoj kaj specife pri la okazigo de la evento pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko. Ŝi partoprenis diversajn kunsidojn pri Faka Agado, komerco, medicinistoj kaj aliaj.

***10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande:*** Tiusence oni ĉiam atentas la homojn kiuj interesiĝas pri tiu ĉi laborsfero, tamen la rezultoj estis malmultaj. Oni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al apliko de E-o en la respektivaj laborsferoj.

***10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko, enlande kaj eksterlande:*** Oni laboris por daŭre informi la esperantistojn pri scienco kaj tekniko. Oni intencis arigi diversajn fakgrupojn sed ankoraŭ ne sukcesas tiurilate. Temas pri daŭra informa laboro.

***10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de E-o en scienco kaj tekniko:*** Tiu ĉi aspekto ankoraŭ estas tre baza kaj ne respegulas la potencialon ekzistantan en la tuta insulo.

***10.4. Flegi la agadon de KEMA:*** Oni laboris dum la jaro speciale pro la preparlaboroj rilataj al SAEST '2000. La medicinistoj estas en kontentiga kontrolo flanke de la komisiito; sed la obstaklo estas la ne kontentiga lingvonivelo de tiuj specialistoj, kiuj tamen interesiĝas pri diskonigo kaj interŝanĝo inter si.

## 11. Libroservo

***11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo:*** Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo. Ni sukcesis publikigi **Ekzercaro-n de la Dua Nivelo** kaj **Baza-n vortaro-n por komencantoj**; eldonis la kasedojn **Juliano kantas, Latinamerika mozaiko, Voĉoj el Kubo** kaj **Pensi kaj ami esperante**; akiris milon da moneroj pri la 75-a UK; ŝtampis kovertojn, ktp.

***11.2 Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande:*** Ekde la unuaj momentoj, la komisiito pri Libroservo malsaniĝis kaj fine rezignis; la estrarano pri Financoj entreprenis la aferon dum la jaro kaj, pro tiu koncepto, ni sukcesis enspezi 4 174,40 kubajn pesojn. Tamen, kiel rezulto de ne efika funkciado de la libroserva sistemo, kelkaj filioj ŝuldas monon al la NE: Cienfuegos (118,00) kaj Pinar del Río (100,00).

**12. Atento al alilandaj esperantistoj**

La atento al eksterlandanoj ekkomencis ekde la unuaj momentoj de la jaro kun la preparkondiĉoj por ilia ebla partopreno dum la 3-a Nacia Kongreso. Jam en marto, dum la evento, ni organizis kelkajn promenadojn, inter ili la vizito al la Placo de la Revolucio. Ankaŭ por la Kongreso ni preparis 6-paĝan broŝureton enhavante ĝeneralajn informojn pri Kubo kaj aliajn aferojn en rilato kun nia agado. Kadre de la 20-a datreveno de KEA, la grupo profitis la okazon fari promenadon tra la urbo. Dum la 84-a UK, ni disdonis dekojn da KEATUR-informiloj al partoprenantoj, k. kontaktis kun la redaktoro de **Eventoj**. Kadre de la kunsido de Monda Turismo, ni interrilatiĝis kun ĝia prezidanto, kiu donis al ni la «Memoran Platon» kiel anon de M.T. Por la IKEK-Konferenco, la grupo organizis kelkajn antaŭ kaj postaŭ ekskursoj; sed, pro diversaj kialoj, ili ne efektiviĝis. El eksterlando, rimarkindas la kontribuo de S-ro Eddy Raats, kiu multe helpas la Asocion kaj speciale la laboron de la grupo.

**13. Atento al verkistoj**

Dum la jaro 1999 la Komisiito daŭrigis la verkadon de diversaj materialoj, kiuj aperis en la E-gazetaro kaj revuoj, inter ili Avanco, kun kiu li regule kunlaboras. Li krome prelegis dum la IKEK - Konferenco, kaj post interkonsento kun S-ro Vilhelmo Lutermano, kunlaboras kun li pri reviziado de tekstoj aperantaj ĉe hejmpaĝo enhavanta literaturaĵojn en Interreto. La materialojn pri la novelaro li antaŭ sufiĉe da tempo enmanigis al S-ro Alex Humet. Ili jam estis lingve korektitaj kaj mankas nur respondo fare de S-ro Humet.
Pri la esearo li informas, ke kelkaj aŭtoroj ankoraŭ ne transdonis la manuskriptojn, kaj pri tio li informis siatempe.

**14. Tra la filioj**

Camagüey
En organiza agadkampo la filio sendube avancis. Dum la jaro ili regule kunsidis kaj sendis koncernajn protokolojn. Rilate al aliaj laborsferoj ili estis tre aktivaj en la publikaj rilatoj pli fortaj ol dum la antaŭa jaro. La estraranoj ĉiam zorgis pri kunlaboro kun la ŝtataj organizoj. Tiu kunligado helpis multe la funkciadon de la filio kaj donis prestiĝon en la nuntempa periodo. La rilatoj kun politikaj, registaraj instancoj kaj rilatorgano bone funkciis. En la kultura fako ili faris seriozan laboron kiu speguliĝis en la nacia renkontiĝo okazinta fine de oktobro. Oni regule okazigas diversajn kulturajn aranĝojn kaj pri historiaj temoj. La filio organizis en la lernejo Dr. Fernando Ortiz solenajn aranĝojn por honorigi historiajn datojn komence kaj fine de la kursoj. Ene de tiuj momentoj oni liveris diplomon al la finkursanoj. Oni daŭrigas la elsendon de E-kurso per radio ĉiusemajne. La kurso enhavas 32 lecionojn. En la dua semestro oni komencis ekspresajn kursojn (kvarmonatajn) por komencantoj kaj progresan kurson por progresantoj. En la Katedro pri Progresaj Lernadoj, la kurso enhavas tri fakojn: Gramatiko, Universala Kulturo kaj Ĝenerala Praktiko. Tio signifas por la diplomitaj membroj grandan avantaĝon de nia instrua agado.

Urbo Havano
Dum la jaro 99 la filio ekhavis novan estraron preziditan de Julián Hernández, kiu eklaboris surbaze de laborplano en ĉiuj laborsferoj de la Asocio. Ili okazigis ĉiumonate la ordinarajn

kaj unu eksterordinaran kunsidojn. Menciindas la laboro rilate organizajn aspektojn kaj aktualigo de membrokontrolo. Oni laboris por revigligi la movadon en la provinco kaj en la municipo Centro Havano en kies sidejo oni okazigis plurajn aranĝojn, seminariojn. Revigliĝis la grupo en municipo Diez de Octubre, sed ne stabiliĝis en Plaza nek sukcesis krei grupon en Arroyo Naranjo. Rilate al informado oni garantiis regulan diskonigon pri E-o kaj KEA-agado per naciaj kaj provincaj radiostacioj. Oni muntis ekspoziciojn en la centra biblioteko de municipo Playa, en la domo de instruistoj de Arroyo Naranjo kaj en presbitera preĝejo de Centro Havano. Membro de la estraro ankaŭ kunlaboris kun la informiloj **Jajabo** (S. Spíritus) kaj **La Fontano** (Villa Clara). Ili kunlabore kun la NE organizis la centran omaĝon pro la datreveno de KEA. Ili aktive partoprenis la organizon kaj klerigajn programerojn de la IKEK-Konferenco kaj organizis ties Interkonan Vesperon. Reprezentantoj

de la filio partoprenis la naciajn renkontiĝojn en Camagüey kaj Guantánamo. La estraro vigle laboris por garantii la instruan laborsferon kaj propagandi la kursojn; tamen, kun la escepto de la lernejo en Diez de Octubre, la rezultoj ne estis kontentigaj kiel atendite. Oni faris konversacian kurson, kreskigis la nombron da lernantoj en la PKK kaj daŭre atentis ilin, kunlabore de Albania Duthil, sekretariino de la Nacia Sidejo. Oni aktive partoprenis la nacian seminarion por instruistoj. La publikaj rilatoj estis modestaj kun la diversaj institucioj, sed tiusence ankaŭ kunlaboris kun la NE.

## ĈEFAJ TASKOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 2000

1. INFORMADO
   - 1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.
   - 1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o.
   - 1.3. Garantii la eldonon de la organo **Avanco** (3-foje jare), **La Noktuo** (4-foje), **Universo** (6-foje) kaj aliaj filiaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.
   - 1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro.
   - 1.5. Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.
2. NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ
   - 2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 21-a datreveno de KEA.
   - 2.2. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Urbo Havano.
   - 2.3. Okazigi Nacian Seminarion pri Informado en Villa Clara.
   - 2.4. Atenti la okazigon de SAEST '2000.
3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ
   - 3.1. Labori por revigligi la movadon en tiuj teritorioj kun jura personeco: Insulo de la Junularo kaj Havano.
   - 3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Las Tunas, Holguín, Cienfuegos, Pinar del Río kaj Villa Clara.
4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo.
4.2. Atento kaj vizitoj al filioj.
4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.
4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

5. PUBLIKAJ RILATOJ
5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble.
5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo.
5.3. Rilati al aliaj asocioj kulturklerigaj, UNESCO, UNO, Kariba Asocio kaj la Kuba Movado por la Paco; laŭkaze, iniciati konkretan kunlaboron.

6. FINANCOJ
6.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj.
6.2. Plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj.
6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute.
6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.

7. INSTRUADO
7.1. Regulaj kursoj.
7.2. Kreskigi la PKK-n kaj daŭre atenti ties partoprenantojn diversmaniere.
7.3. Okazigi regionan seminarion por instruistoj en Camagüey por altigi iliajn lingvan kaj kulturan scipovojn.
7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: Distanca Kurso, konkursoj, prelegoj, ktp.
7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj.
7.6. Nacia Seminario por Instruistoj.

8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ
8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.
8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo omaĝe al la 21-a datreveno de KEA.
8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.
8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj. Partopreni la Havanan Librofoiron.
8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.
8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.

9. INTERNACIAJ RILATOJ
9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj E-institucioj.
9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.

10. FAKA AGADO

10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.

10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko enlande kaj eksterlande.

10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de E-o en scienco kaj tekniko. Garantii la efektivigon de SAEST'2000.

10.4. Flegi la agadon de KEMA.

11. LIBROSERVO

11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.

11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.

12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.

12.2. Pretigi lokajn esperantistojn ekde informa vidpunkto por atenti alilandajn esperantistojn.

13. ATENTO AL VERKISTOJ

13.1. Kolekti la mankantajn materialojn por finpretigo kaj eldono de la libro omaĝe al la 20-jariĝo de KEA.

13.2. Prispuri la materialojn pri la novelaro por eventuala rehavigo kaj eldono.

13.3. Daŭre instigi nian samideanaron interesiĝantajn pri beletro al verkado.

## Interkonsentoj de la 17-a Komitatkunsido de KEA

1. Aprobi la tagordon de la Komitatkunsido.
2. Aprobi S-ron Pedro Fernández kaj S-inon Yoandra Rodríguez kiel respondeculoj pri la protokolo de la Komitatkunsido.
3. Aprobi la proponon membrigi S-rojn Julián Hernández Kaj José Luis Montes de Oca al la Komisiono pri Financo.
4. Aprobi la bilancon pri nacia valuto (CUP).
5. Aprobi la bilancon pri forta valuto (USD).
6. Aprobi la buĝeton por la jaro 2000 kaj en nacia kaj en forta valutoj.
7. Labori en la ŝanĝo de la membrokarto de la Asocio.
8. Aprobi la ĉefajn taskojn por la jaro 2000.


Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro